

James Krüss,
Johano, la leporo
tradukita de Manfred Retzlaff

Johano, la leporo,
zigzage kuras sur
la kampo frumatene kaj
li ĝojas pri l' natur'.

Li saltas al aliaj
leporoj, krias li:
Vekiĝu, ĉar tagiĝis jam,
kaj Paskon festos ni!

Petolas la leporoj
sub la brilanta sun'.
Subite scias ĉiu, ke
Pasktempo estas nun.

*Traduko de la Germana poemo "Hans Benjamin, der Hase" de JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, *1926-05.31 - †1997-08.02) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1989-08-24.*

MR-229-2 / Arg-662-1328 (2012-11-18 18:52:27)